

4a PASKA DIMANĈO – A – 7an de MAJO 2017

MI ESTAS LA PORDO DE LA ŜAFOJ

Komento al la Evangelio de p. Alberto Maggi OSM

El la evangelio laŭ Johano 10, 1-10

En tiu tempo Jesuo diris:

„Mi certigas vin: se iu eniras en la ŝafejon ne tra la pordo, sed grimpante de alia parto, tiu estas ŝtelisto kaj rabisto. Sed kiu eniras tra la pordo, estas la paŝtisto de la ŝafoj. Al li la pordisto malfermas, kaj la ŝafoj aŭskultas lian voĉon; li vokas ilin laŭ iliaj nomoj kaj elkondukas ilin. Kiam li elirigas siajn ŝafojn, li iras antaŭ ili. La ŝafoj sekvas lin, ĉar ili konas lian voĉon. Male, fremdulon ili ne sekvas, ĉar ili ne konas la voĉon de fremduloj.” Jesuo diris al ili ĉi tiun alegorion, sed ili ne komprenis la signifon de liaj vortoj.

Tiam Jesuo diris denove al ili: „Mi certigas vin: Mi estas la pordo por la ŝafoj. Ĉiuj, kiuj venis pli frue ol Mi, estis ŝtelistoj kaj rabistoj; sed la ŝafoj ne aŭskultis ilin. Mi estas la pordo: se iu tra Mi eniras, tiu saviĝos; li povas eniri kaj eliri, kaj trovos manĝon. La ŝtelisto venas nur por ŝteli, buĉi kaj pereigi; sed Mi venis por ke miaj ŝafoj havu vivon, kaj havu ĝin abunde.”

Ĉar li malfermis la okulojn al la denaska blindulo, Jesuo estis akuzita esti pekulo, ĉar, laŭ ili, peko estas la malobeo de la dia leĝo. Nu, Jesuo rebatas, asertante, ke ili, la fariseoj, estas la pekuloj, ĉar, laŭ Jesuo, peko estas tio kio ofendas la homon, kaj al la fariseoj Jesuo adresas la admonon entenatan en la deka ĉapitro de la evangelio de Johano, al la tiamaj fariseoj, sed ankaŭ al tiuj hodiaŭaj. Ni aŭdu, kion skribas por ni la evangeliisto.

“Mi certigas vin”, ĉi tiu esprimo, en la evangelio de Johano, signifas mi tion diras firme, “Mi diras al vi”, do la parolo estas adresita al la fariseoj “se iu eniras en la ŝafejon”, ĉi tie la evangeliisto, por indiki la ŝafejon, utiligis terminon kiun oni kutimas ne por la ŝafoj, sed por la antaŭkorto de templo, ĉar

Li volas komprenigi: atentu, ne temas pri ĉirkaŭbariloj kaj pri ŝafoj, sed temas pri popolo kaj religia institucio, *"ne tra la pordo, sed grimpante de alia parto, tiu estas ŝtelisto kaj rabisto"*. Jesuo estas tre klara, Li estas parolanta al la fariseoj: vi estas ŝtelistoj, ĉar vi alproprigis al vi la popolon de Dio, Jesuo estis Dio, la vera paŝtisto, kaj, precipe, vi estas rabistoj, ĉar vi utiligis perforton por subigi ĉi tiun popolon. Fone de la denunco de Jesuo, estas la tuta akuzo kiun profeto Jezekiel faras, aparte en ĉapitro 34, al la paŝtistoj, kiuj regas la ŝafaron nur por propra intereso, por propra avantaĝo, kaj ne zorgas pri la bono kaj la bonstato de la ŝafoj.

Kaj daŭrigas Jesuo: *"Sed kiu eniras tra la pordo, estas la paŝtisto de la ŝafoj"*, Jesuo depostulas ke Li, kiel Dio, estas la vera paŝtisto de sia popolo, *"Al li la pordisto malfermas, kaj la ŝafoj aŭskultas lian voĉon;"*, kial la ŝafoj aŭskultas lian voĉon? Ĉar ili rekonas, en la voĉo de Jesuo, la respondon al la bezono, al la deziro pri pleneco de vivo, kiun ĉiu persono enhavas en si mem. *"li vokas ilin laŭ iliaj nomoj"*, Jesuo ne havas rilaton kun la amaso, kun ŝafaro sed Jesuo havas specialan rilaton kun ĉiu unuopulo, kun ĉiu ŝafo, *"kaj elkondukas ilin."*, la verbo utiligita de la evangeliisto estas tiu utiligita en la libro Readmono, por indiki la liberigon disde la sklaveco, al la lando de libero. *"Kiam li elirigas"*, laŭvorte elpelas, *"siajn ŝafojn,"* - jam Jesuo, en la epizodo de la eniro en Jerusalemon, estis elpelinta la ŝafojn el la templo - *"Kiam li elirigas siajn ŝafojn, li iras antaŭ ili. La ŝafoj sekvas lin, ĉar ili konas lian voĉon"*: Jesuo liberigas la ŝafojn el la ĉirkaŭbarilo de la religia institucio, sed ne enfermas ilin en alian ĉirkaŭbarilon, eĉ se plibonan, li konsentas al ili la plenan liberecon.

Kaj daŭrigas Jesuo: *"Male, fremdulon ili ne sekvas,"*, ĉi tiu de Jesuo ne estas konstato, estas konsilo kiun Li donas, oni devas forkuri de tiuj kiuj sin prezentas kiel paŝtistojn, kaj kontraŭe, kiel ni vidos, estas nur rabemaj lupoj, *"ĉar ili ne konas la voĉon de fremduloj»"*, la ŝafoj konas la voĉon de tiu kiu ilin amas, kaj ne de tiu kiu volas ilin ekspluati, ili rekonas en la voĉo de la falsaj paŝtistoj, la deziregon de povo, la deziregon de regado. *"Jesuo diris al ili"*, do li turniĝas al la fariseoj, *"ĉi tiun alegorion,"*, sed jen la surprizo, *"sed ili ne komprenis la signifon de liaj vortoj."*, kiel ili povas ne kompreni? Simple, ĉar ili ne estas liaj ŝafoj, ĉar ili ne estas surdaj sed estas obstinaj en sia tento pri povo, pri ambicio.

"Tiam Jesuo diris denove al ili: „Mi certigas vin: Mi estas", kaj jen la depostulo de la nomo de Dio, la pleneco de la dia kondiĉo kiu manifestiĝas en Jesuo, *"Mi estas la pordo por la ŝafoj. Ĉiuj, kiuj venis pli frue ol Mi, estis ŝtelistoj kaj rabistoj;"*, do Jesuo ripetas la akuzon, al la religiaj estroj, pri alproprigo de la ŝafaro kiu estis de Dio, Dio estis ĝia paŝtisto, kaj pri subigo pere de perforto, *"sed la ŝafoj ne aŭskultis ilin."*, jen la konstato de Jesuo: la popolo estis subigita pro timo, ne pro sia propra elekto.

"Mi estas la pordo: se iu tra Mi eniras, tiu saviĝos; li povas eniri kaj eliri,", ĉi tiu eniro kaj eliro signifas, ke Jesuo ne enfermas la ŝafaron en alian ĉirkaŭbarilon, kaj la pordo ne estas fermata, la fermo de la pordo indikas sekurecon por la ŝafaro, tamen mankon de libero; ne, se oni sekvas Jesuon estas plena libero, oni eniras kaj eliras. *"kaj trovos"*, kaj ĉi tie la evangeliisto

ludas per la greklingvaj terminoj, "*kaj trovos manĝon.*", laŭvorte paŝtejon, kiu en la greka estas "nome", dum leĝo estas "nomos". Tiam, kun Jesuo, oni ne trovas leĝon por obei, sed paŝtejon, manĝon kiu vivigas.

Kaj fine, Jesuo utiligas por tiuj sindirantaj paŝtistoj la samajn ecojn de lupoj, do ili ne estas paŝtistoj, sed lupoj, oni devas atenti, "*La ŝtelisto venas nur por ŝteli, buĉi kaj pereigi;*", kaj jen la eĥo de la akuzo jam farita de profeto Jezekiel, en ĉapitro 22: "Ĝiaj potenculoj en ĝi estas kiel lupoj, kiuj disŝiras kaptitaĵon, verŝas sangon, pereigas animojn, por akiri profiton.". Do Jesuo identigas ĉi tiujn paŝtistoj kiel lupojn, do oni devas atenti, oni devas forkuri, "*ŝteli, buĉi kaj pereigi*", la veraj viktimoj de la kulto ĉe la templo estas la personoj, "*Mi venis por ke miaj ŝafoj havu vivon, kaj havu ĝin abunde*», do ĝi estas invito de Jesuo emancipiĝi de tiaj paŝtistoj, kiuj altrudas, kiuj devigas, kaj akcepti la donacon de la pleneco de vivo, kiun Jesuo proponas senkondiĉe, al ĉiu persono kiu aŭskultas lian voĉon.